

Kun Tiburcjusz Tiblewsky pri La libreto por sportistoj, Saluton amiko

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1986.05.17.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-170/Radiokasedo-170-11-86-A-1055-Claude-GACOND-kun-Tiburcjusz-Tiblewsky-La-libreto-por-sportistoj-Saluton-amiko.mp3>

Cl.- Vi aŭdas elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond kaj Tyburcjusz Tyblewski prezentas la libreton por sportistoj, Saluton amiko.

TT.- Hodiaŭ ni parolos ne pri la verko de granda literaturo, sed pri libreto certe legota de miloj. Jen alvenis la informo, ke en Kalgario, en Kanado pretiĝadas la poŝlibreto "Saluton, amiko".

Tiun gravegan laboron komencis kaj dinamisme faras malgranda komitato el Kalgario, kie somere 1988 okazos la Olimpiaj Ludoj.

Ni ĉiuj scias, ke multaj geinterpretistoj ĉe ĉiuj olimpiaj ludoj bone servas. Tamen ĝis nun la komunikado inter malsamlingvaj konkursantoj kaj oficialuloj estas nereкта; ĝi estas triangula. Kanadaj esperantistoj esperas faciligi al sportistoj la olímpian vivon, ebligante:

- a) iom da amika komunikado - rekta, sendependa, egaleca, "sen lingvaj moŝtoj" (kiel ili diras);
- b) pli fortan senton de sekureco, hejmeco, plezuro.

Tiun etan libreton (15x17 cm, do tamen iom pli granda ol Kalendaro de "Monato"); tiun libreton oni antaŭvidas 62-paĝa en kvar lingvoj. Unue, la nacia, poste Esperanto, poste la franca kaj la angla. Ĉiu maldekstra kolumno enhavos la samajn esprimaĵojn en la lingvo de iu ajn el la multaj partoprenantaj landoj. Ricevos ĝin ĉiu sportulo kaj ĉiu oficialulo senpage. La aŭtoroj celas priservi per ĝi ne nur la somerajn sportojn, sed ankaŭ la vintrajn kaj multajn ĝeneralajn temojn.

Kaj jen aŭskultu pri la enhavo. La libreto konsistas el 5 ĉapitroj, en kiuj la aŭtoraro prezentos:

1. Saluton de la urbestro kaj de la prezidanto de Kalgaria Olimpia Komitato. Tiu ĉi parto povos esti ŝanĝata laŭ la gastigonta urbo.
2. Ŝlosilon de prononcado de Esperanto por la koncerna lando kaj iom pri la lingvo internacia.
3. Somerajn kaj vintrajn olímpiajn ludojn: gravaj vortoj aŭ esprimaĵoj kaj kelkaj mallongaj komentoj aŭ demandoj rilate ĉiun el la individuaj sportoj.
4. Ĝeneralajn temojn : amikaj esprimaĵoj (antaŭ- kaj postkonkursaj; je renkontiĝo, je disiĝo); avizoj kaj avertoj; telefono; banko; poŝto; kuraciloj; zorgo pri korpo; malsanoj; vundoj; numeroj; kvantoj; poentaroj; horo; vetero; vestoj; manĝado ktp.
5. Adresojn de ĉiuj landaj esperanto-asocioj.

Nun vi devas iom streĉi la atenton, ĉar sekvos la sportbranĉoj de someraj olimpiaj ludoj. En "Saluton, amikino" oni pritraktos: bicikladon, bokson, korbopilkon, flugpilkon, piedpilkon, gimnastikon, narterlevadon (vi scias, imagu la ŝvitantan frunton) manpilkon, grundhokeon, kajakadon, luktadon, naĝadon, plonĝadon, pafadon, arkopafadon, akvopilkon, rajdadon, remadon, skermadon (rapiro, spado, sabro), veladon, judon kaj atletikon. En la lasta estas multaj disciplinoj. Jen: diversaj kuroj - la stafeta, la bariera, la obstakla, maratono; diversaj salto - la tri-, la longa, la alta, la stanga, - diversaj ĵetoj - per lanco, per disko, per martelo, per

pezglobo. Sekvas marŝo kaj kunmetitaj disciplinoj (dekatlono, pentatlono). Ekzemple en la moderna pentatlono estas: rajdo, skermo, pafo, naĝo kaj kuro.

Cl.- Ne malmulte, ĉu? Imagu, kiom da forto bezonas la dekatlon ulo!

TT.- Sed estas la vintraj sportoj. Por olimpio oni enprogramigas: skiadon - alpan kaj nordan; en la unua oni slalomos kaj alvalos, en la dua - kuros kaj saltos kaj krome kuros kaj pafos en tiel nomata biatlono. Restas sketado, glaciĥokeo, luĝado, sportsledado. Eĉ mi ne certas, ĉu ni menciis ĉion.

En ĉiu disciplino dum olimpiaj ludoj rivaladas la naciaj skipoj kaj strebas triumfi. Imagu, kiom da homaj emocioj, kiom da streĉoj... Ne ĉiam oni kondutas interpopole. Foje male !

En tia situacio povi interkompreniĝi fariĝas surpriza avantaĝo, kiun la sportuloj akceptos dankeme. Vi certe memoras, ke olimpiaj ludoj starigas antaŭ si la noblajn celojn ne ĉefas venki, sed gravas partopreni. Legante la tekston, mi trovis inter Kalgariaj esperantistoj la olimpian etoson de kunlaboremo, kiu devas doni pozitivajn rezultojn.

Cl.- Ĉar, aŭskultu, kion ili celas:

- a) la entrepreno tute ne estas komerca,- laboras nur volontuloj kaj presado okazos pro la mono kolektita de donacintoj;
- b) en la libreto ne aperos la nomoj de la kunaŭtoroj nek tiuj de la tradukantoj, nek tiuj de la Komitato;
- c) oni ne intencas ligi la tekston kun Kalgario kaj Kanado, por ke la metalaj presplatoj (donacotaj al UEA) povu servi al gastiganto de la olimpiaj ludoj ĝis la jaro 2008.

TT.- La sola rekompenco por la kunlaborantoj estos senpagaj ekzempleroj de la libreto. La tradukaĵoj nacilingvaj, ricevataj de la koncernaj landoj, estos preparataj en Kalgario tiel, ke la presisto malgrandigos la ricevatajn paĝojn, kopios ilin sur adhera papero, poste la volontuloj tranĉos ilin en striojn kaj kompletigos la presitajn libretojn.

Cl.- Vere, la laboro ŝajnas giganta! - Kiom da homoj faros tion?

TT.- Mi ne scias, sed certe ne estas potenca grupo. Ni ja konas membrecon de kluboj. Ĉion-ĉi mi scias de s-ino Dorothy Hawley el Kalgario, kiu petis la tekst-kontrolon. Eble dank'al tio ni ricevos por Svisa Radio Internacia iun el la fruaj ekzempleroj? Ni jam nun deklaras nin pretaj ekzerci...

Cl.- Ĉu halterlevon?

TT.- Ne, ne, kompreneble la sportecan lingvon internacian! Kaj dume - elkoran gratulon al niaj kanadaj gekolegoj pro la koncepto kaj pro la impona kaboro!

Cl.- Tyburcjusz Tyblewski, vi diris, ke vi kontrolas la provtekston. Kiel vi faras tiun ĉi laboron ?

TT.- La ĉefa tasko konsistas en tio, ke mi provas kontroli ĝustecon de la proponitaj frazoj aŭ terminoj. Fakte en sporto ankoraŭ mankas sufiĉe preciza lingvo, Esperanto. Estis kelkaj provoj, la plej populara tiu de hungaro István Nagy, kiu estas aŭtoro de la sporta vortaro, sed

eĉ dum tiu kanada provo oni konstatis ke ne ĉiuj vortoj povas esti akceptitaj. Do la kunaŭtorino de la libreto, kanadino Dorothy Hawley, kiu konas min de tridek jaroj, petis mian konsilon ne kiel sportan aŭtoritatulon, sed kiel la homon konantan Esperanton. Ĝuste tion mi faris konsilante al ŝi eventuale mallongigi la frazojn, ĉar ŝajnas al mi, ke en sporta lingvo tio ĉefas, ke la frazoj ne estu komplikaj, ili enhavu maksimumon da esenco en minimumo da vortoj. Kaj en tio, en kelkaj rimarkoj gramatikaj, ktp. konsistis mia laboro, kion mi devis urĝe fari dum tri tagoj.

Cl.- Kiam oni praktikas sporton, oni tuj rimarkas ke la ofte proponitaj terminoj ne konvenas al la lingvo Esperanto. Ni prenu la ekzemplon ‘descendi’. Dum dudekunu skiferioj mi praktikis skiadon en Adelboden kaj tre rapide montriĝis, ke tiu verbo ne korespondas al Esperanto, kaj tiam alvenis la vorto ‘alvali’. Kiu ankaŭ havis poste la korespondon : ‘alsupri’ kaj pro tio ni ĉiam parolis poste pri alvala skiado, kiel oni ankaŭ parolas pri promena aŭ kura skiado.

TT.- Jes !

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond kaj Tyburcjusz Tyblewski prezentis la aperontan libreton por sportistoj *Saluton amiko*. Ĝis la venonta sabato!